

Informilo de Septembro 2013

Numero 5, September 2013

98a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko

En la tri tagoj antaŭ la kongreso okazis denove Nitobe-Simpozio organizita de la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo. Ĉi-jare, 40 invititaj gastoj el 23 landoj diskutis problemojn ligitajn al la uzado de la angla lingvo en la sistemoj de universitatnivela edukado en neanglalingvaj landoj. La energiplena diskuto rezultis en decido pri la daŭrigo de la kontaktoj de pluraj el la partoprenintoj. Pli da informoj (en la angla) troviĝas en la retejo de Esperantic Studies Foundation (<http://esperantic.org/en/nitobe2013>).

Dum la Kleriga Lundo de la Universala Kongreso, Stefano Keller kaj Humphrey Tonkin parolis pri la strukturo de UN, prezentis la agadojn en Ĝenevo kaj Nov-Jorko kaj la organizon Esperanto kaj UN kaj la eblojn de partopreno en ties agado. Interalie interesiĝis pluraj membroj de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) pri kunlaboro, i.a. koncerne eblan partoprenon de TEJO-representanto en la jara konferenco de IANYD (Inter Agency Network on Youth and Development) en septembro en Nov-Jorko, kaj eblan kunvenon de junuloj el la nov-jorka regiono kun la celo instigi ilian partoprenon en la agadoj ĉirkaŭ Esperanto kaj UN. Stefano Keller, kiu reprezentas la Asocion en Ĝenevo, reelektiĝis kiel estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj.

E-USA kaj UNA-USA

Dum la landa konferenco de Esperanto-USA en Raleigh, NC, en julio, Humphrey Tonkin interkonsentis kun la estraro de E-USA ke ĝi petu membrecon kiel asociiĝinta organizo de la usona Asocio pri Unuiĝintaj Nacioj. La nov-jorka grupo servos kiel ligilo inter ambaŭ organizoj. La membreco kiel asociiĝinta organizo donos al la esperantistoj pli da ebloj koncerne rektan aliron al UN-materialo kaj pli da ebloj informi pri Esperanto en UN-rondoj.

Agado en Ĝenevo



Foto: Stefano Keller kaj Rita Izsák

Paralele kun la 23a sesio de la Homrajta Konsilio, disvolviĝis la 6an kaj 7an de junio la "Fakula kunsido pri la rajtoj kaj sekureco de religiaj minoritatoj" en la ĉefa Oficejo de la Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj en Ĝenevo. La kunsidon gvidis Rita Izsák, la UN-ĉefo pri minoritataj aferoj.

La komisiitoj de UEA Verena Graf kaj Stefano Keller partoprenis la eventon. Krom kelkaj ŝtataj reprezentantoj ĉeestis pluraj fakuloj, juristoj, raportantoj de UN kaj delegitoj de NRO-j.

Antaŭ la fino de la kunsido, Stefano Keller kiel la lasta alparolanto reagis al la disvolviĝo de la evento, bedaŭrante ke ĝi okazis nur en la angla lingvo, sen interpretistoj kaj sen eblo uzi alian UN-lingvon. Li atentigis, ke sekve pluraj interesatoj estis elfermitaj de la kunsido. Li alvokis pri serioza konsidero de la lingva aspekto de komunuma kunvivado, pledante por pli da atento al tiu grava komponento de la homaj rajtoj.

Sian alparolon li finis invitante la kunsidantaron al la UK en Rejkjaviko, kie ĝuste la temo "justa komunikado" estos traktata.

Sonregistraĵo de la alparolo: <http://goo.gl/uxiNI>

La teksto aperos ĉe <http://www.linguistic-rights.org/eventoj/> kaj en la retejo de UN.

La evento ebligis al la estrarano de UEA transdoni al s-ino Rita Izsák ekzempleron de la junia numero de la revuo Esperanto, en kiu aperas ŝia teksto pri Esperanto 125-jara.

Pli da informoj pri la evento en la [raporto de Stefano Keller](#).

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041

www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041